ESPERANTO
MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ
INFORMILO 9
SEPTEMBRO 2014 Kol. 353/30

xxxx

Laŭ aliĝoj ni du estis solaj ĉeĥoj dum la UK en Argentino. Ni estis agrable surprizitaj, kiam elserĉis nin la kanadano Milan Sveda kaj alparolis nin per bela ĉeĥa lingvo, el kiu ni eksciis, ke li devenas el la moravia urbo Brno, el kiu li foriris en la sesdekaj jaroj.

La kongreso havis normalan kadron kaj ne estis facile elekti inter kongresaj prelegoj kaj ekskursoj. Tradicie la merkredo estis dediĉita al tuttaga ekskurso kaj el ĝi ni preparis bildan videon-filmon, kiun spektos tiuj, kiuj venos en septembro al la lingva seminario en Skokovy aŭ al la konferenco de ĈEA en Prostějov. Laŭ niaj tempebloj ni strebis partopreni plejmulte da prelegoj. El la traktado estis videbla granda klopodo envicigi en la E-movadon plej multe da junuloj, sed oni forgesis, ke kreskas eĉ "junuloj" de olda tempo, kiuj pere de sia agad-laboro povas "altiri" gejunulojn.

Estis aprobita propono de interreta voĉdonado por substreki la fakton, ke elspezoj por vojaĝado estas grandaj kaj kontraŭe la interreto estas rapida kaj atingebla kaj ebligas ankaŭ intergrupan diskutadon. La distancon inter Eŭropo kaj la ceteraj kontinentoj oni ne povas pli malmultekoste superi..

Ĉiuj programoj kaj ekskursoj kiel ĉiam estis allogaj. La solena fermo estis kvazaŭ "amuza teatro" kun multaj dankoj kaj floroj por ĉiuj lokaj helpantoj. La nova prezidanto de UEA Mark Fettes kreis novan tradicion. En sia fina parolo li proponis la eblon de persona adiaŭo de la partoprenantoj kun estraranoj, do ankoraŭ du horojn post la fino ĉiuj en la antaŭsalono reciproke premis la manojn kaj promesis pluan kunlaboron en bela verko nomita Esperanto.

Viktor kaj Libuše Dvořákovi, tradukis J.Rýznarová

La 100-a UK okazos en la franca urbo Lillo en la jaro 2015

Nia asocio AEH preparas busvojaĝon por la kongreso en la venonta jaro. Tamen ĝis nun aliĝis nur 21 homoj. Ni scias, ke tutan jaron antaŭe aliĝi estas tre riska por tiuj, kiujn turmentas iaj sanproblemoj. Tamen ni devas scii, ĉu ni plenigos la buson (46 lokoj), ke la vojaĝo ne altigu niajn elspezojn.

Sed hodiaŭ (la 3-9-2014) fine venis aliĝilo en www paĝoj de UEA, ni kopiis ĝin kaj ni sendas ĝin al tiuj, kiuj jam aliĝis ĉe ni. Bonvolu plenumi atenteme la aliĝilon de UEA kaj ankaŭ la aliĝilon por busvojaĝo kaj ambaŭ sendu **al nia redakcio.**
Antaŭpagon 5 000,--Kč sendu al la konto de AEH ĉe Poštovní spořitelna, konto 192150088, kódo de la banko 0300, variabila simbolo (estas numero super Via adreso).

Kiu ĝis nun ne decidis, ĉu kunveturi per la buso kun AEH, rapidu kaj skribu peton pri aliĝiloj. En oktobra Informilo ni proponos nian busekskurson al slovakaj aŭ hungaraj esperantistoj. red.

La Universala kongreso en la jaro 2016 okazos en Slovakio, en la urbo Nitra

Laŭ jam multjara tradicio, ankaŭ ĉi-jare la komitato de UEA ne trovis tempon por diskuti la strategian laborplanon. Tamen strategia planado devas iĝi konstanta afero, diris prezidanto Mark Fettes. Estis fine farita decido pri reta voĉdonado, kaj anoncita la kongresurbo 2016. La kongresa rezolucio laŭ Brian Moon enhavas belajn vortumojn, kiuj tamen ne tradukeblas sencohave. (Fragmento el Libera folio)

Kien malaperis la esperantistoj?

Ne nur la Universala Kongreso ĉi-jare estis rekorde malgranda. Aliĝis nur 706 personoj el 56 landoj. Eble nur venontan monaton ni povos publikigi raportaĵon el la UK en la Argentina Bonaero. Nur okdeko da esperantistoj el la tuta Eŭropo ekster Kroatio partoprenis la Eŭropan Esperanto-Kongreson en Rijeka, al la 10-a jubilea kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio aliĝis 146 personoj, inter kiuj 59 el Kroatio, sekve el aliaj 20 landoj aliĝis nur iom pli ol 80 esperantistoj. Estis granda seniluziiĝo...Kaj aliaj aranĝoj en Eŭropo same ne imponas, diversaj naciaj kongresoj ankaŭ ne kreskas. Se ni sumigos la partoprenintojn de ĉiuj internaciaj aran-ĝoj en Eŭropo ĉi-somere, ni ne atingus la ciferon de mil partoprenantoj.

Kien malaperis la esperantistoj?
Zlatko Tišljar pripensas en interesa artikolo la kialojn de la ŝrumpo kaj donas du proponojn por vigligi la movadon... Ĝi estas legebla en la reta bulteno Libera Folio ĉe: http://www.liberafolio.org/2014/kien-malaperis-la-esperantistoj

Aperis hotelo “Esperanta” en Ĉinio

Laŭ la anonco donita de Baotou-a E-Asocio, aperis loka hotelo “Esperanta”, la asocio interkonsentis kun Ping'an-hotelo, mezgranda hotelo en Baotou, ke la hotelo akceptu esperantisto-vizitantojn kun favora prezo. Por pli da informoj bonvole vizitu:
www.espero.com.cn/2014-07/11/content_32924502.htm

De **El Popola Chinio**12-7-2014

Markitaj padoj por rulseĝuloj

Jam de la jaro 2009 Klubo de Ĉeĥaj Turistoj kreas markitajn padojn por rulseĝuloj. La padoj estas markitaj per direktmontriloj kun kolora pinto kaj kun simbolo de rulseĝulo kaj ili estas dividitaj laŭ la malfacileco, deklivo kaj supraĵo de la pado. Estas uzitaj tri koloroj kaj la koloro signifas malfacilecon. Blua-facilaj padoj por rulseĝuloj sen akompano kaj elektrorulseĝoj. Blua pado estas sen ascendo (nur en mallonga sekcio ĝis 8%), kun transversa deklivo ĝis 2%. Maksimuma ŝtupo 2 cm-oj.

Ruĝa-estas por lertaj rulseĝuloj, rulseĝuloj kun akompano kaj elektrorulseĝoj. Ascendo estas ĝis 6% (en mallongaj sekcioj 12%), transversa deklivo ĝis 4% kaj ŝtupo ĝis 5 cm-oj.
Nigra-estas por rulseĝuloj kun akompano kaj terenaj elektrorulseĝoj. Ascendo atingas 12%, kelkloke ĝis 20%. Transversa deklivo maks. 6% kaj ŝtupo ĝis 7 cm-oj.
Ĝis nun estas markitaj la sekvaj padoj de tiuj ĉi jaroj:
de 2009 en Brno-Mariánské údolí (Valo de Maria) 11 km-oj;

de 2010 en Lutová;
de 2011 en Plzeň (Pilseno) - du rondoj 4 km-oj blua kaj 5 km ruĝa;
de 2011 en Hradec Králové 14 km-oj ruĝa kaj blua,
de 2012 en Prago-urba parto Stodůlky blua; de 2012 en Vizovice nigra;
de 2013 en Kladruby ĉe Vlašim; de 2013 en Hrabyně ĝis nun la lasta.
La rulseĝuloj estas certaj, ke ili traveturos la padon senprobleme. Ie ili jam povas trovi senbarierajn pensionojn. Ĉio estas laŭ la projekto „Turismo por ĉiuj“. Ladislav Hakl

8-a Mezorienta Esperanto-Kunveno

Vizitu Tunizion kaj renkontu la nordafrikajn kaj mezorientajn esperantistojn.

Renkontiĝo de esperantistoj el nordafrikaj kaj mezorientaj landoj en Tunizio en la jaro 2015-a. Temo: Tunizio: lando de renkontiĝo inter civilizoj.
Loko: Hammamet
Datoj: de la 28-a de marto ĝis la 2-a de aprilo 2015, inkluzive de postkunvenaj ekskursoj.
Programo: prelegoj, ekskursoj, artaj aranĝoj! Tute aparta konkurso pri kono de la poemoj de la tunizia poeto Abu-al-Kasim Aŝ-ŝabi.
Aliĝoj kaj informoj ĉe: mezorienta.kunveno@esperanto.org aŭ ĉe http://ttt.uea.org/vikio/index.php/La_oka_Mezorienta_Kunveno en_Tunizio_en_2015

Samideanoj, alkoholiĝu laŭ mia instrukcio,

alinome mallonga ekskurso en forenzan* psiĥiatrion

La polico kaj la juĝaj instancoj petas ofte medicinajn ekspertizojn en la kazoj, kiam trafika orientiĝo estas ĉi tie koncizaj karakterizaĵoj de plej oftaj problemoj.

1. **Alkoholo:** Enhavo de alkoholo en alkoholaj trinkaĵoj:

biero 10 gradoj ……. 28 gr. / litro
biero 12 gradoj……...34 gr. / litro
vino .....120 gr. / litro

destilita alkoholaĵo 40% ..... 350 gr. / litro

La nivelo de alkoholo en sango kalkuliĝas laŭ la formulo:

$$C = \frac{a - (p \cdot t \cdot k)}{p \cdot r}$$

Kie **: C -** serĉata koncentriĝo de alkoholo en sango
a - totala kvanto da trinkita etanolo en **gramoj**
p - pezo de la persono en **kilogramoj**
t - tempo de la metabola procezo en **horoj**
k - metabola **konstanto** - por viroj mezkvante **0,1**
por virinoj mezkvante **0,085**
r - konstanta kvanto da akvo en la korpo - por viroj **0,68**
por virinoj **0,55**

Ekzistas ankaŭ tiel nomata **faktoro beta (β)**, determinanta la kvanton de alkoholo, **kiu eliminiĝis dum unua horo el la korpo.**
Ĉe nivelo ĝis 2 promiloj **β** = **0,12 - 0,18** (mezvaloro 0,15)
kaj ĉe nivelo super 2 promiloj faktoro **β** = **0,24** kaj pli.

Kvanto da alkoholo en la sango:
ĝis 0,5 promilo ĉe la homo ne estas signoj de ebrio
0,5 – 1,5 promiloj estas malgrava ebrio
(kun mova plumpo, plilongita reakcia tempo je la vidaj kaj aŭdaj stimuloj…)
1,5 – 2,5 promiloj estas meza ebrio
(kun ŝanceliĝo, neegala paŝado kaj koleraj afekcioj)
2,5 promiloj kaj pli estas grava ebrio
(kun desorientiĝo kaj kun perturbo de lucideco)
3,0 kaj pliaj promiloj estas jam stadio de alkohol-toksiĝo.
Ekzistas ankaŭ terminoj „ komplika ebrio“ ĉe ĝi estas frapante kvantitativa modifado en konduto kaj „ patologia ebrio“, ĉe ĝi estas delira stadio. Ĉe komplika ebrio kaj patologia ebrio rekonadaj kaj regaj funkcio estas nulaj. Atentu ĉe eventuala simulado!

Redukto de alkoholo el la sango

La valoroj en la tabelo servas nur por orientiĝo (proksimumaj taksoj) !
Influojn havas ankaŭ medikamentoj kaj sanstato.

Redukto de alkoholo el la sango de viro kiu pezas 85 kg:

Biero 10gr.	**tempo**	**Biero 12gr.**	**tempo**	**Vino**	**tempo**	**Alkoholo 40%**	**tempo**
0,5	2:15	0,5 l	2:45	0,2 l	2:28	0,5 dcl	3:15
1,0 l	4:30	1 l	5:30	0,4 l	4:56	1 dcl	4:30
1,5 l	6:45	1,5 l	8:15	0,6 l	7:24	1,5 dcl	6:45
2,0 l	9:00	2 l	11:00	0,8 l	9:52	2 dcl	9:00
2,5 l	11:15	2,5 l	13:45	1 l	12:20	2,5 dcl	11:15
3,0 l	13:30	3 l	16:30	1,2 l	14:48	3 dcl	13:30
3,5 l	15:45	3,5 l	19:15	1,4 l	17:16	3,5 dcl	15:45
4,0 l	18:00	4 l	22:00	1,6 l	19:44	4 dcl	18:00
4,5 l	20:15	4,5 l	24:45	1,8 l	22:12	4,5 dcl	20:15
5,0 l	22:30	5 l	27:30	2 l	24:40	5 dcl	22:30

Redukto de alkoholo el la sango de virino kiu pezas 60 kg

Biero 10	tempo	Biero 12	tempo	Vino	tempo	40% Alkoholo	tempo
0,5	3:42	0,5 l	4:31	0,2 l	4:04	0,5dcl	3:42
1,0 l	7:24	1 l	9:12	0,4 l	8:08	1 dcl	7:24
1,5 l	11:07	1,5 l	13:33	0,6 l	12:13	1,5 dcl	11:07
2,0 l	14:49	2 l	18:04	0,8 l	16:18	2 dcl	14:49
2,5 l	18:31	2,5 l	22:35	1 l	20:22	2,5 dcl	18:31
3,0 l	22:15	3 l	27:06	1,2 l	24:26	3 dcl	22:13
3,5 l	25:57	3,5 l	31:37	1,4 l	28:30	3,5 dcl	25:57
4,0 l	29:38	4 l	36:06	1,6 l	32:34	4 dcl	29:38
4,5 l	33:20	4,5 l	40:37	1,8 l	36:38	4,5 dcl	33:20
5,0 l	37:02	5 l	45:08	2 l	40:42	5 dcl	37:02

2. Metamfetaminaj drogoj

Se estas en la sango metamfetamino aŭ ĝiaj metabolitoj super la valoro de **0,025 mg/litro,** la ŝoforo estas nekapabla stiri veturilojn. La biologia duoniĝa tempo de metamfetamino estas de 12 ĝis 34 horoj. Eŭforiaj fenomenoj ekzistas de 8 ĝis 24 horoj.
Redukto de drogoj el la sango daŭras de tagoj ĝis semajnoj.

La matenojn sen postdrinkaj kapdoloroj al vi amike deziras via psiĥiatro *Max Kašparů*

Libro-kurso de Praktika Radiestezo

Aperis nova E-libro pri Radiestezo de la brazila inĝeniero José Roberto Ruiz el la urbo San Paŭlo, kiu la libron tradukis al Esperanto kaj laŭ ĝi li instruas en kursoj. Verkis ĝin Charles Brouard.

La ĉefa celo de tiu ĉi libro estas lernigi la radiestezon al personoj per simplaj metodoj kaj identigi malprofitajn anomaliojn, kiuj influas la homan, vegetalan kaj bestan sanon tiel, ke oni povas kaŭzi la "kuracadon".
La radiesteza diagnozo estas libera. La laboro farata per radiestezo ne estas la sama kiel de terapeŭtisto, ĝi estas laboro de fizikisto. Fizikisto, ne kuracisto, ĉi tiu estas la devizo, kiun oni devas memori kaj apliki". Vi povas legi ĉe:
http://www.alumiar.com/1511-librokursodepraktikaradiestezo

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo= 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA : aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.